

**TIEL ESTIS DIRITE AL LA ANTIKVULOJ, SED MI DIRAS AL VI –  
Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Mateo 5,17-37**

***En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:***

***"Ne pensu, ke Mi venis por abolicii la leĝon aŭ la instruojn de la profetoj: Mi venis ne por detrui, sed por doni al ili la veran signifon. Mi solene deklaras al vi, ke dum ekzistos ĉielo kaj tero, nek vorteto nek komo estos forstrekita de la dia leĝo; kaj tio estos ĝis la plenumo de ĉio. Sed kiu malobservos eĉ nur unu el la plej malgravaj ordonoj, kaj tiel instruos homojn, tiu estos la plej malgranda en la regno de la ĉielo; dum, kiu plenumos ĉiujn ordonojn kaj tiel instruos la aliajn, tiu estos granda en la regno de la ĉielo.***

***Certa estas ĉi tio: se vi ne plenumas la volon de Dio pli serioze ol faras la fariseoj kaj la leĝinstruistoj, vi ne eniros en la regnon de la ĉielo.***

***Vi scias, ke estis dirite al la antikvuloj: "Ne mortigu. Kiu mortigos iun, estos kondamnata de tribunalo". Sed Mi diras al vi, ke se iu koleras kontraŭ sia frato, tiu estos kondamnata de la juĝisto. Kaj kiu diras al sia frato: "stultegulo", tiu estos punata de la supera tribunalo; kaj kiu diras: "perfidulo", tiu povas esti punata per la infera fajro.***

***Tial, se vi prezentas vian oferon al la altaro de Dio, kaj vi memoras, ke via frato havas ion kontraŭ vi, lasu tie vian oferon antaŭ la altaro, iru repaciĝi kun via frato, kaj poste revenu kaj prezentu vian oferon.***

***Se iu havas kverelon kontraŭ vi kaj kunvokas vin antaŭ tribunalon, rapide repaciĝu kun li, dum vi estas ankoraŭ sur la vojo, ĉar li povos transdoni vin al juĝisto, kaj la juĝisto al la gardistoj, por***

**ke vi estu ĵetata en malliberejon. Mi certigas vin, ke vi ne eliros el tie, ĝis vi pagos la lastan moneron.**

**Vi aŭdis ke estas dirite: "Ne adultu"; sed Mi diras al vi: kiu rigardas virinon kun malbona intenco, jam adultis kun ŝi en sia koro.**

**Se via dekstra okulo pekigas vin, elŝiru kaj forĵetu ĝin; ĉar estas pli bone por vi, ke unu el viaj membroj pereu, ol ke via tuta korpo estu ĵetita en la inferon. Kaj se via dekstra mano pekigas vin, detranĉu kaj forĵetu ĝin; ĉar estas pli bone por vi, ke nur unu el viaj membroj pereu, ol ke via tuta korpo iru en la inferon. Estas dirite: "Kiu volas forsendi sian edzinon, devas doni al ŝi eksedzigan leteron". Sed Mi diras al vi, ke ĉiu, kiu forsendas sian edzinon, escepte se temis pri neleĝa interrilato, donas al ŝi adulteblecon. Kaj kiu edziĝos kun virino forlasita de sia edzo, tiu ankaŭ adultas.**

**Plue vi aŭdis, ke estis dirite al niaj patroj: "Ne malvere ĵuru, sed plenumu la promeson ĵuritan antaŭ Dio". Sed Mi diras al vi: Neniam ĵuru: nek per la ĉielo, ĉar ĝi estas la trono de Dio; nek per la tero, kiu estas benketo de liaj piedoj; nek per Jerusalemo, ĉar ĝi estas la urbo de la Sinjoro. Nek ĵuru per via kapo, ĉar vi povas fari eĉ ne unu haron blanka aŭ nigra. Sed via parolo estu: jes, jes; ne, ne! Ĉio ekster tio venas de la diablo".**

La anonco de Jesuo pri la beatecoj kiel nova interligo inter Dio kaj lia popolo, devis esti ne bone akceptata de la popolo mem kaj de la disĉiploj. Kial? Ili atendadis la alvenon de la regno kiel signon de granda brilo kaj manifestiĝo de potenco, Izraelo estus haviganta al si la riĉaĵojn de la paganaj nacioj kaj ĝi estus superreganta.

Kaj do la invito de Jesuo per la beatecoj, kiu ne estas tiu sin riĉiĝi sed eĉ male tiu kunpartigi kaj sin meti je la alies servado, ne devis esti

akceptita. Jen kial Jesuo diras 'ne'. Ĝi estas la ĉapitro 5 de Mateo, versiklo 17, "*Ne pensu ke mi venis por...*" kaj li uzas la verbon ne abolicii, kiu estas utiligebla por iu leĝo, sed 'ruinigi, faligi' kiu estas utiligata por konstruaĵo, "... *la leĝon aŭ la profetojn*", maniero per kiu oni indikas tion kiun ni nomas Malnovan Testamenton.

Jesuo do diras: " Tiun konstruaĵon de la regno kiu trairadis la tutan leĝon kaj la profetojn, mi ne venis ĝin disfaligi" sed "*sed por doni al ili la veran signifon*", ne kiel vi pensas, sed kiel mi diras al vi, tio estas ne pere de la akumulo de riĉaĵoj, sed pere de la praktikado de la kunpartigo, ne pere de la regado super la aliaj, sed pere de la servado. Kaj, precipe, ne por iu popolo ekskluzive, sed adresata al la tuta homaro.

Kaj Jesuo daŭrigas: "*Mi solene*", certigas Jesuo, "*ke dum ekzistos ĉielo kaj tero*" maniero por diri la tutan kosmon, "*nek vorteto nek komo estos forstrekita de la dia leĝo; kaj tio estos ĝis la plenumo de ĉio*". Jesuo do certigas la plenan realigon de la projekto de la regno.

Kiam estas iu komunumo kiu akceptas la beatecojn, la regno iĝas reala kaj poste ĝi devas nur larĝiĝi, plivastiĝi. Jesuo poste admonas: "*Sed kiu malobservos*" , laŭvorte 'ignoros, flankelasos' " *eĉ nur unu el la plej malgravaj ordonoj*" li ne referencas al la ordonoj de la Mosea leĝo kiun Jesuo ne citis, sed li referencas al la beatecoj, kiujn, kompare al grandeco, al graveco, al severeco de la ordonoj, Jesuo difinas plej malgravaj.

Nu, kiu ignoras la beatecojn, estos konsiderata plej malgrava, aŭ kontraŭe granda, en la regno de la ĉielo, tie kie granda estas tiu kiu ilin respektas. Tiuj esprimoj plej malgrava aŭ granda ne indikas iun hierarkion en la Dia regno, sed ĝi indikas la apartenon aŭ la ellason. Kiu ajn do kiu ignoras tiujn beatecojn estos ellasata el la regno, kiu ilin praktikas estos enlasata.

Mi memorigas ke 'regno de la ĉielo' estas esprimo utiligata nur de Mateo por indiki la regnon de Dio, do ne temas pri iu regno en la ĉielo, la transmondo, sed pri la regno de Dio, la nova socio kiun Jesuo venis inaŭguri, kie Dio prizorgas la homojn ne promulgante leĝojn kiujn tiuj devas respekti, sed komunikante al ili sian Spiriton.

Kaj ĝuste pro tio Jesuo admonas siajn disĉiplojn dirante: "*se vi ne plenumas la volon de Dio*" oni celas la fideleco al la interligo, "*pli serioze ol faras la fariseoj kaj la leĝinstruistoj*" tio estas formala fideleco, fideleco ligita

laŭvorte, sed ne laŭspirite, *"vi ne eniros en la regnon de la ĉielo"*. Do se ne estos fideleco malsama ol tiu laŭvorta kaj formala de la fariseoj kaj la leĝinstruistoj, ne estos aparteno al la regno.

Poste Jesuo komencas malkonstrui – jen tio jes – la tradiciojn de la pasinteco por ilin anstataŭigi per io nova, nemezureble pli bela. *"Plue vi aŭdis, ke estis dirite al niaj patroj..."*, estas provoka tiu eldiro de Jesuo. LI estus devinta diri: *"Vi komprenis ke estis dirite al niaj prapatroj"*, kaj male Jesuo parolas pri la antikvuloj, do io negativa.

*"Ne mortigu"*, nu Jesuo diras: *"Sed mi diras al vi"* kaj ĉi tie li prononcas sesfoje tiun eldiron per kiu li anstataŭigas la novon de lia alianco al la manovo, al tiu de la antikvuloj, *"se iu koleras kontraŭ sia frato, tiu estos kondamnata de la juĝisto"* kaj kiu lin insultas estos submetata al sindrio, la plej grava juĝorgano, kaj kiu diras al li eĉ *"frenezulo"*, kio signifas *"perfidulo"*, *"tiu povas esti punata per la infera fajro"*.

Kion volas diri Jesuo? Kiam en la rilato kun la alia vi ekkoleras kaj ne tuj deprajmas tiun koleron, kaj tiu kolero transformiĝas en insulton kaj la insulto kaŭzas eĉ la ellason de la alia el via vivo – tiu estas la signifo de *'frenezulo'* – nu tiam vi estas destinita al la infera fajro, la rubujo de Jerusalemo. Nome Jesuo diras al siaj disĉiploj: *"Kiu ellasas iun el sia vivo, tiu ellasas sin mem el la vivo de Dio"*.

Kaj jen kial gravas, diras Jesuo, ke antaŭ la rilato kun Dio, la neceso estas iu bona rilato kun la frato. Jen do ke Jesuo proponas ekzemplon: *"se vi prezentas vian oferon al la altaro de Dio, kaj vi memoras..."* ne ke vi havas ion kontraŭ via frato, sed ke via frato havas ion kontraŭ vi, iru repaciĝi. Do la repaciĝo kaj la sereneco en la komunumo estas tiom gravaj ke ili antaŭas la devojn rilate al Dio.

Kaj pro tio Jesuo diras ke oni sin konduku bonvoleme al la aliaj. Kaj poste li daŭrigas: *"Vi aŭdis..."* kaj ĉi tie li pritraktas la tiklan temon de la adulto, *"...ne adultu; sed Mi diras al vi: kiu rigardas virinon"* kaj li utiligas la vorton por indiki la edziĝintinon, do ies edzinon *"kun malbona intenco"*. Ne temas ĉi tie pri la normala seksa deziro de la viro rilate al virino, kiu estas parto de la ordo de la kreado, sed pri la konsidero de alies virino kiel objekto alproprigebla.

Nu por Jesuo *"tiu jam adultis kun ŝi en sia koro"* en sia konscienco. Kaj Jesuo donas indikojn, rimedojn. *"Se via dekstra okulo..."*. Li parolis pri rigardi

kaj la okulo indikas la deziron, *"pekigas vin"*, tio estas malhelpo, *"elŝiru kaj forĵetu ĝin"*, tio estas se en via vivo estas iu kriterio, iu konduto – poste Jesuo eldiros la ekzemplon de la mano kiu indikas agadon – nu, ankaŭ se doloriga, eltiru tiujn kondutojn el via vivo, ĉar alie ili portos vin al memdetruo.

Fakte diros Jesuo *"Ol ke via tuta korpo estu ĵetita en la inferon"*. Do se en via vivo estas iu sinteno, iu konduto, kiun vi scias povas esti malhelpo por la pleneco de via ekzisto, ĝin forĵetu, ankaŭ se doloriga, pli ol tute ruinigi vian ekziston. Kaj Jesuo poste pritraktas ankaŭ la repudion. Ne temas ĉi tie pri divorco, sed pri repudio, unuflanka agado de la viro rilate al ties edzino.

Kaj povis esti repudiata kio ajn. Nu Jesuo ne samopinias. Li diras: *"Ĉiu, kiu forsendas sian edzinon, escepte se.."*, kaj Mateo utiligas la vorton *porneia*, kiu havas vastan gamon de signifoj, ĝuste por ne faligi en la kazuistikon la vortojn de Jesuo. Kaj ĉi tie ĝi estis tradukita per *"neleĝa interrilato, kaj kiu edziĝos kun virino forlasita de sia edzo, tiu ankaŭ adultas"*.

Kaj fine Jesuo referencas al rilato kiu devas ekzisti ene de la komunumo, rilato de sincereco kaj granda malkaŝemo, kaj do li referencas al la kutimo de la ĵuro kiun Jesuo tute ekskludas ene de sia komunumo. Diras Jesuo: *"Sed via parolo estu: jes, jes; ne, ne!"*

La buŝo do devas esprimi tion kio enestas en la koro, tio kio enestas en la menso, sen ajna hipokriteco aŭ falsaĵo, ĉar, atentigas Jesuo: *"Ĉio ekster tio venas de la diablo"*. La diablo estas tiu kiu, laŭ la biblio kaj laŭ Jesuo, enkondukis en la mondon la mensogon, kaj ĝi estas bildo de la povo. Ĉio plua en la parolado estas por avantaĝo de la regostrukturoj por domini la aliajn, Jesuo do invitas, en la rilatoj kun la fratoj, en la rilatoj ene de la komunumo, utiligi senperan lingvaĵon, ne diplomatian lingvaĵon, ne oportunecan lingvaĵon, sed klaran kaj rektan.